# De 120 jaroj Esperanto en Ŝverino --

# festu kun ni la jubileon !!





**Karaj en- kaj eksterlandaj gesamideanoj!**

En la jaro 1905 Marie Hankel kaj Gotthilf Sellin estis la unuaj Ŝverin-anoj, kiuj lernis nian ŝatatan lingvon. Pro ĉi okazo ni ĉijare festos la supre menciitan jubileon kaj kore invitas vin tion festi kun ni.

Grava indiko:

Por serioze plani ĉi eventon, ni urĝe petas,
ke vi anoncu vin ĝis la 31-a de julio
ĉe → fopoko@freenet.de ←

En la nomo de la Esperanto-klubo Schwerin
salutas vin amike
Franz-Peter Kurtz kaj André C. Weber




## Gravaj datenoj por nia jubileo:

| | | |
|---|---|---|
| tago kaj tempo: | | **6-a de septembro 2025**<br>de la 10:30-a horo ĝis la 17-a horo |
| loko: | | konstruaĵo apud la preĝejo „Paulskirche“<br>**Am Packhof 8; D-19053 Schwerin**<br>*→ [piede nur 5 minutojn de la ĉefa stacidomo]* |
| manĝaĵoj: | | Ni preparos kafon kaj keksojn, akvon kaj sukon.<br>Post la promenado eblos tagmanĝi en unu el la rapid-restoracioj / etmanĝejoj en la urbocentro |
| kostoj: | | Bonvolu rekompensi niajn elspezojn<br>per kontribuo de 5 € po persono. Dankon!<br>La monon ni enkasigos kontante ĉe alveno de la gastoj. |
| **programo:** | | La programo enhavos la jenajn punktojn:<br>▪ (video- ) prelego pri la historio de Esperanto en Ŝverino<br>▪ Lumbildprelegoj pri la 109-a UK en Aruŝo (Tanzanio) kaj pri pri Esperanto- vojaĝo tra Japanio dum marto 2024<br>▪ Mallonga promenado, „Kvin perloj de la UNESKO Monda Heredaĵo apud la preĝejo Sankta Paŭlo“<br>▪ Birke kaj Bertilo muzikas<br>▪ Kafoklaĉo |